GISTO, JAN,2009.
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Senpaga legaĵo disdonata dum la tradicia Verda Kafo
Kiu negas sian monatan ĉeeston inter la rondanoj, tiu sentu sin ŝulda pri la Gisto-fasono, 1,00.

.....

SONĜO

Ĉu vi kredas ke sonĝo havas signifon en nia vivo? Kelkaj homoj panikiĝas post kiam ili havis inkubon. Bonvenas via opinio. Mi mem restas neŭtrala observanto.

La nokton de 10 al 11/01/09 okazis al mi rara sonĝo. Mi rakontos la iom maleblajn sed klarajn detalojn: iu gravulo, nevidebla, staris je mia dekstra flanko kaj sugestis ke mi malfermu ĉeestliston. Li surtabligis blankan paĝon antaŭ mi, enmanigis al mi globskribilon kaj diris. “vi komencu la liston. Signaturu per via kompleta nomo”. Mi alrigardis la paperon antaŭ ol signi sed nun tie kuŝis ne foto sed jes viva homo, virino tute nuda, ventrosube. Ŝi havis belajn sencicajn mamojn. Iom ĝenate mi demandis la viron, ĉu mi vere devas skribi sur la virina brusto? Jes, ja, ŝi estas mia edzino. Tiam mi alrigardis la tutan korpon, bela figuro sed la vizaĝo estis ne videbla. Senharara pubo vidigis la nudan piĉon . La voĉo insistis: skribu vian tutan nomon sur ŝia brusto. Mi provis sed la skribilo ne obeis, la inko ne fiksiĝis sur ŝia haŭto kiu cedis al la skribmovoj. Mi provizis min per plumskribilo kaj provis sed fariĝis nur aĉaj makuloj. Tiam mi vekiĝis.

Sonĝojn kutime mi baldaŭ forgesas kaj ili ne kaŭzas al mi signifan impresojn sed, pri ĉi laste okazinta, plaĉus al mi ekscii prognozon far ĉi-kampaj“tradukistoj”. Nu, BV ne senti sin ĝenata, se malfacilas kontakti spertulon pri tia scio.Tio plaĉus al mi, almenaŭ por kompari, detalojn kun eble tiurilataj okazontaĵoj. Antaŭdanke mi atendas eblajn respondojn.

LA PLUVA TAGO (Varinghien)

Kontribuis instr. Cezar.

La tago malvarma, malgaja, sensuna;
Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna;
Vitujo je l’muro putranta sin tenas,
Sed ĉiu ekblovo foliojn deprenas,
Kaj la tago malvarma, sensuna.

Mia vivo malvarma, malgaja sensuna,
Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna,
Miaj pensoj sin tenas je l’tempoj pasintaj.
Kaj la tagoj – malvarmaj, sensunaj.

Ekhaltu, ho koro malgaja, ne plendu!
Post nuboj la suno radias – atendu!
Ne sola al vi tiel kun sorto batalas,
En vivo de ĉiu la pluvo falas
Kelkaj tagoj – malvarmaj, sensunaj.
..... Kunlaboris nia diligenta Cezar.
Aldonas mi: parkeriginda teksto estas ĝi .Gekaruloj, oni devas antaŭzorge stoki utilaĵojn, por onta publika E-evento ĉijara...!

ĈU MALFACILAS ENDORMIĜI?

Jen 100% efika rimedo kotraŭ tiu plago: Elektu laŭplaĉan temon, komencu unue per ne tro longa poezio el 3 aŭ 4 kurtliniaj strofoj. Enkapigu ĉiuvespere unu aŭ du liniojn, dum vi lasas la ĉelitan lumon ŝaltita. Post kiam vi sufiĉe ilin scias, komforte kuŝiĝu sur la de vi preferata flanko kaj invitu Morfeon per malŝalto de la lumo. Vigle ripetadu la pokajn unuajn liniojn, ĝis enuo.Venontan vesperon, krom la sciatajn liniojn adoptu du pliajn kaj laŭ la sama método atendu Morfeon. Vi surpriziĝos pri viaj ambaŭ sukcesoj. Unue pro via lertiĝo;due pro via ĉiunokta dormo.

Tio, por ne paroli pri la kutimaj enkapaj “lumbrikoj” bredataj de gefraŭloj.

LENIO

Malgraŭ longjara angliĝo nia estimata londonano, amiko Lenio, ne perdis la gaŭĉeskan moron de bonedukituloj sendi, okaze de jarŝanĝo, belan bondezirkarton al siaj geamikoj. Same ĉi lastan decembron alvenis plejzorge elektita bildkarto. Mi intencis reciproki la bondezirojn dum EchoLink-QSO sed la fuŝulo avaras pri sia ĉeesto, samkiel faras ĉiuj gravuloj de la E-movado. Eble mi lernu ke tia sinteno nun ankaŭ en la E-movado estas ŝika. Do, jen mia danko kun elstaraj bondeziroj al vi, tre estiminda Lenio.

SUKER- SALUJOJ

Se ni estus veraj kuraĝuloj, ni metus sur ĉiujn tablojn de ĉiuj manĝejoj, sukerujojn surhavantajn nacilingvajn tekston kun iel jenan legaĵon: DOLĈIGU VIAN VIVON. ESPERANTO HELPOS! – Nu, kiom el niaj rondanoj vetas en Megacena, por rajtigi al Esperanto pluki ĝojigan sukcesaron?

E-LERNADO

Domaĝe por ke latinidoj simpatiu Esperanton malfacilas multe pli ol por plejmultaj eŭropanoj. Krom sciantoj de la usonangla, latinidoj abomenas prononci la literon H. Ni prenu por ekzemplo la vorton HELPOS.

Eŭropano tuj pensas pri HELP kaj la kunteksto klarigas ĝian signifon sed latinido (brazilano) legas ELPOS kaj restas al li/ŝi neniu helpeto por pensigi pri helpo. La samon konsiderendas pi la ceteraj, kun komencaj aŭ mezaj H-vortoj.

STATISTIKO

Gisto montras la plej verdajn gaŭĉajn samideanojn, kiuj plej alte stariĝis sur la VK-podio dum la jaro 2008: Miguel akurate ĝojigis la rondanojn dum 12 fojoj; R.Zaguetto, dum 11 fojoj; Solon kaj Arno, dum 9 fojoj; Cezar dum 8 fojoj. La ceteraj ŝuldas al ili reverencon pro ilia elstara rango de diligentuloj.

LONGVIVULOJ

Geedzoj mortis samtage. Ili promenadis pace en la ĉiela paradizo, ĝuis nekonatajn belaĵojn, frandis superbajn bongustaĵojn kaj senfine amuziĝis. La edzino ĉiumomente manifestis eksterordinarajn plezursentojn. La edzo bremsis ŝian sintenon: “Vi kulpas pro via maloportuna ideo, ke ni fariĝu vegetaranoj. Sen tio ni povus esti ĝuantaj ĉi ĉarman vivon multajn jarojn antaŭe!”

BOPATRINO

Ĝendarmo haltigas aŭton.

- Dokumentoj, bv! Vi rapidis je 130 Km/h.
- Ne, sinjoro, mi veturadis je 100 Km/h. La bopatrino, malantaŭ la ŝoforo, ĝustigas: vi rapidis je 130 Km/h. // La veturigisto malafable paŭtis alrigardante ŝin.
- Via antaŭa dekstra limlumo paneis...
- Nu, eble “pifis” de pokaj minutoj.
- Kia fiaĉa senkulpigo. De du semajoj vi anoncis la neceson riparigi ĝin – ĝustigis la bopatrino. – La veturigisto signas al ŝi: vi silentu!
- Vi ne uzas sekurigan rimenon – diras la ĝendarmo.
- Nu, ja vere sed mi deprenis ĝin, nur por alpreni la dokumentojn.
- Aĥ, ĉesu! Vi neniam uzas ĝin – diras la bopatrino. – La veturigisto eksplodas pro kolero:
- Fermu la buŝon, enuiga aĉa oldulino!!
- ĉu li ĉiam kriegas tiel al vi? Demandas la ĝendarmo, turniĝinte sin al la bopatrino.
- Ne, li nur mistraktas min post kiam li drinkis.

Kontribuis la radiokolego Almejda (Kampo Grande-MS)

“VENENO”

Dum kuracista kongreso unu el ili estis surprizita de sia edzino dum okazis elstare agrabla konversacio kun superbe bela blondulino, en angulo de la hotela kafejo.

- Kiel vi du konatiĝis ? scivolis la edzino.
- Profesie, profesie, li tuj respondis.

La ĵaluzega edzino aerglutis kaj samtempe pafis signifoplenan fajran rigardon al li kaj demandis: ĉu profesio via aŭ ŝia ?

Tria paĝo.

Saĝe verkita estorio, far Hu Gong. Ĝi emociigas.

DEZIRO DE EDZINO

Pasintan vintron, post tri-semajna kuracado en hospitalo, mia edzino Ajzen mortis de leŭkemio. Dum la kuracado mi akompanis ŝin hejmen por pasigi Novjaran Tagon, kiu estis la lasta fojo en ŝia vivo. Ŝi ordigis la ĉambron, kolektis ĉiujn siajn fotojn por ilin forpreni. Venis la tempo adiaŭi la unujaran filinon venven, kiu surprizite levis la kapon: “Panjo, kien vi iros?”

“Mia kara, mia kara!” Kaŭriĝinte, Ajzen diris al la filino. “Kisu min ankoraŭfoje. Panjo vizitos alian landon.”

La edzino brakumis la filinon vango ĉe vango. Larmoj ekfluis de ŝiaj okuloj.

Apenaŭ ŝi sidiĝis en taksion, ŝi ekploregis. Mi firme brakumis ŝin, por ke ŝi kvietiĝu. Kiel edzo mi konis Ŝian firmecon, kian malmultaj virinoj havas. Dudek tagojn post ŝia morto, mi ricevis paketon kun 17 leteroj envolvitaj en parfumitan mantukon. Sur ĉiu koverto estis gluita poŝtmarko sen stampo sur la fronta flanko. Laŭ kaj dato notita de ŝi sur la dorsa flanko. Laŭ la dato mi malfermis la unuan leteron kaj voĉlegis ĝin al la filino:

Kara mia Venven. Ĉu vi sopiras panjon? Mi sopiras vin en ĉiu tago. Nun mi skribas al vi tiun ĉi leteron en alia lando, kaj post longa tempo mi povos hejmen reveni. Ĉu vi obeas paĉjon kaj la vartistinon, kiam mi ne estas ĉe vi? – La lasta frazo estas “Mi brakumas Venven.” Tiamaniere post dua aŭ tria semajno ni ricevis unu leteron “senditan el eksterlando”. En la leteroj ŝi atentigis min pri vestado laŭ la sezonalterno, pri aĉeto de greno kaj pri la nutrado de la filino. Ĉiufoje kiam mi legis ilin, larmoj malsekigis miajn okulojn; kiam Venven ĉagreniĝis pro sopiro al la patrino, mildaj vortoj en la letero ĉiam trankviligis ŝin. Iom post iom ŝajnis al ni, ke ŝi estas en Japanio. Mi jam kutimis atendi ŝian leteron. En ŝia naŭa letero la edzino konsilis al mi havigi novan patrinon por Venven. “Eĉ se vi reedziĝos, mi ankaŭ estos via edzino” tiel ŝi skribis.

Post unu jaro mi konatiĝis kun Jali, mia nuna edzino, kiu tre similas al Ajzen laŭ aspekto kaj karaktero. Kvankam ŝi spertis eksedziniĝon, tamen ŝi ne havis sperton flegi infanon. Ŝia naiveco kaj gajeco plaĉis al mi kaj mildigis mian malgajecon. Mi rakontis al ŝi pri Veven kaj la deziro de la edzino.

“Mi volas provi,” Jali respondis. Lasu min viziti ŝin kaj mi rigardu, ĉu ŝi ŝatos min.” – Fine de aprilo, t.e. ses monatojn post ricevo de la 16ª letero, mi voĉlegis al Venven la lastan leteron de ŝia patrino.

Anstataŭ sin Ĵeti al mi por kapti la leteron aŭ porti benketon por sidi antaŭ mi, Venven nur donis indiferentan rigardon al mi kaj amuziĝis denonove per sia urso-ludilo.

Kara etulino mia: Finiĝis mia lernado, baldaŭ mi revenos! Mi revidos vian paĉjon kaj mian karan, ĉu vi ĝojas? Post tiel longa tempo eble mi ne povas rekoni vin. Ĉu vi povos rekoni min?

Mi observis la mienon de Venven. Kun maltrankvilo mi rimarkis, ke ŝi tutanime banis la urso-ludilon, kvazaŭ nenion aŭdinte.

Kion mi diru al ŝi? Mi ekkonsciis ke ŝi baldaŭ 3-jariĝos. Iun serenan dimanĉon, akompanate de mi, Jali eniris en nian domon, ĵus kiam la vartistino finkombis al Venven la hararon. Kun nudaj piedoj la etulino, sidante en lito, foliumis koloran bildgazeton.

Venven, mi sentis mian voĉon tremanta. ”Rigardu, ĉu venas panjo?” – Kun hezito Venven fiksis rigardon sur Jali, kiu surplankigis la ledan kofron, rapidis al la lito kaj brakumis Venven: “Mia kara, ĉu vi ne rekonas min?” – La mieno de Venven estis kompleksa, timema. Mi rigardis tion. Dank’al Dio ŝi demetis la bildgazeton, ekploregis ĝis la vizaĝo ruĝiĝis, poste ŝi frapis Jali per siaj pugnetoj: “panjo, pro kio vi revenis tiel malfrue?”

Jali brakumis la etulinon, kaj la lasta tremante ĉirkaŭprenis ŝian kolon. Jali rigardis min kaj larmoj plenigis ŝiajn okulojn. – “Mia kara” ŝi kisis la vangojn de la etulino, “panjo neniam foriros.”

Ĉion ĉi tion la patrino de la etulino aranĝis por ni antaŭ unu kaj duona jaroj, kiam ŝi kuŝis en la hospitalo.



FLN, 1.955